

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando

Esperantobladet

Joulukuu ♦ Decembro

6/2000



Bona Kristnasko

Fabelkonkurso de Päätalo-instituto, p. 6-10

Aĉtunaj Tagoj p.11 ♦ Jaro de lingvoj p.16 ♦ Nova redakta grupo p.5

Esperantolehti

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitus/Redaktion/Redaktejo: *Aimo Rantanen*

PL 2, 40801 Vaajakoski. ☎ (014) 261 438 ✉ aimo.rantanen@pp.inet.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki. ☎ (09) 530 1804 ✉ ilkka.santtila@esperanto.fi

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 80 mk/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 60 mk; Baltio 60 mk, aliaj landoj 80 mk.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Postisiirtotili/Postgirokonto/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja: *Jukka Laaksonen*

Uudenkylänkuja 2 B 11, 33530 Tampere. ☎ (03) 255 4724; (050) 5829 248; työ/laboro: (03) 249 3313

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja: *Seija Kettunen*

Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609 ✉ kari.kettunen@pp1.inet.fi

Sekretario/Sihtööri: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:

Tiina Oittinen, Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi

Anna Ritämäki, Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ☎ (02) 423 246 ✉ aritamak@ra.abo.fi

Ritva Sabelli, Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 635 902 ✉ ritva.sabelli@sfs.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet:

Jussi Jänntti, Huuhankatu 14 B 8, 70600 Kuopio. ☎ (0400) 859 641

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (03) 348 4245 ✉ markku.saastamoinen@koti.tpo.fi

Aini Vääräniemi, Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala. ☎ (040) 518 7242 ✉ aini.vaaraniemi@pp.inet.fi

Rahastonhoitaja/Kasisto: *Antti Mikkola*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ antti.mikkola@orion.fi

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Toimisto/Officejo: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

UEA:n pääedustaja / Ĉefdelegito de UEA: *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ (09) 275 5528

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

Internet: <http://www.esperanto.fi>

Per nova skipo al nova jaro

Esperantolehti havas novan redaktantaron. La estraro tre kontentas aprobante la novan, pli junan kaj espereble ankaŭ entuziasman redaktan skipon. Tia estas bezonata ne nur por dividi taskojn al pli multaj homoj, sed ankaŭ por servi la informadajn bezonojn de la asocio pli bone kaj pli varie.

Kvankam la enhavo kaj aspekto de Esperantolehti ankaŭ ĝis nun estis tute kontenta, oni tamen povas plibonigi ion kaj tion. Tre grave estas, ke la gazeto regule aperadas kaj ke ĝi informas pri aktualaj aferoj okazintaj, okazantaj kaj okazontaj en la asocio kaj en la movado.

La gazeto antaŭ ĉio estas la organo de la asocio, respegulanta opiniojn kaj sintenojn de EAF, sed krome ankaŭ tiujn de ĝiaj membro-societoj kaj unuopaj esperantistoj. En la redakta skipo estas du estraranoj, kiuj sia parte garantias la kontaktojn kun la decidaj homoj. Sed la gazeto ankaŭ varme bonvenigas kontribuadojn de kluboj kaj unuopuloj pri ĉiaspecaj aferoj, kiuj povus esti interesaj. Ne hezitu do preni krajonon aŭ komenci tajpadon! Esperantolehti povas esti krome forumo de diskutoj inter ni, esperantistoj.

La gazeto estas aliflanke (kun la ttt-paĝoj) ia montrofenestro de la finna Esperanto-

movado. Tial ni ne forgesu aperigi ankaŭ finnlingvan materialon pri la okazaĵoj de la movado kaj ties celoj.

Mi deziras al la redakta grupo bonan kaj fruktodonan kunlaboron inter si kaj kun la asocioj.

La venonta jaro estos "Eŭropa jaro de lingvoj". Tio donas al ni eblecojn informi la grandan publikon pri nia lingvo. Skipo de eŭropaj esperantistoj jam laboras por plani aferojn, kiujn oni povus fari komune. Sed indus krome, ke nia asocio partoprenu en la jaro aparte laŭ siaj eblecoj kaj fortoj. Tre gravas, ke ni povu fari ion okaze de niaj venontjaraj Vintraj kaj Aŭtunaj tagoj. Precipe mi multe atendas, kio okazos en Caisa septembre. Aŭtunaj tagoj (29.-30.9.) nome preskaŭ koincidos kun "Tago de lingvoj" (26.9.), kaj tio donas laŭ mia opinio bonegajn eblecojn kapti atenton de amaskomunikiloj kaj de la granda publiko.

Dum pluva, senneĝa novembra vespero mi deziras, ke ni ricevu taŭgan vintron. Tiel pensante mi deziras al vi ĉiuj feliĉajn kaj varmetosajn kristnaskajn kaj jarŝanĝajn festotagojn!

Jukka Laaksonen

Kokouskutsu

Esperanto-Asocio de Finnlando – Suomen Esperantoliitto r.y.:n sääntömääräinen vuosikokous pidetään sunnuntaina 18. maaliskuuta 2001 alkaen klo 10.00 hotelli Emilia-assa, Raatihuoneenkatu 23 Hämeenlinna. Kokouksessa käsitellään sääntöjen määräämät vuosikokousasiat.

11.11.2000 Hallitus

Alvoko al kunveno

Laŭstatuta jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando okazos dimanĉe, la 18-an de marto 2001 ekde la 10-a horo en hotelo Emilia, Raatihuoneenkatu 23 Hämeenlinna. Pri-traktotaj estas la laŭstatutaj jarkunvenaj aferoj.

11.11.2000 La estraro

Ne hezitu verki al Esperantolehti!

La prezidanto de EAF, Jukka Laaksonen, priskribis trafe nian novan redaktan grupon por Esperantolehti. Redaktaj komitatoj ofte estas kluboj de maljunaj ĝentilhomoj, kiuj plejparte nur diskutas pri la gvidlinioj de redaktado kaj aprobas kiel dungitojn novajn redaktistojn. Nia redakta grupo estas kaj diskutanta pri gvidlinioj kaj mem verkanta. Dum la unua sezio ĉiu grupano prezentas artikolideon al aliaj grupanoj. Poste ni reciproke helpas trovi informfontojn, kio ofte postulas multe da tempo.

Ĉio okazas en neordonema etoso, kio konvenas al krea laboro. Ni preferas diskuti pri ideoj, ne pretaj tekstoj, ĉar tiam ĉiu grupano havas eblon antaŭeniri laŭ sia propra vojo kaj persona voĉo ne estas submetita. Ni estas dum la unua sezio en verkadprocezo, per kiu la sekva numero de Esperantolehti pretiĝas kiel konstruata domo. Mi tre ŝatas la ne-

certecon de tiu verkadprocezo. Nenio estas plenplanita, povas alveni nova informmaterialo kio ŝanĝas antaŭplanitajn ideojn pri la sekva numero.

Alvenis multe da materialo per ordinara poŝto. Ni diskutis vigle inter redaktogrupanoj. Mi pensas ke ĉi tiu nova labormetodo instigis pli multajn finnajn esperantistojn verki por Esperantolehti ol antaŭe. Nun mi devis ordoni geesperantistojn verki, kia miraklo! Ne hezitu verki al estontaj numeroj de Esperantolehti. Nia redakta grupo tute ne volas monopoligi la finnan Esperanto-verkadon. Eble vi nun trovas inter la redakto-grupanoj personon al kiu vi pli volonte sendus kontribuajojn por sekva Esperantolehti. Sed la kolofona adreso de redaktejo validas ankaŭ nun. Verku, verku.

Aimo Rantanen

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna
aperas dum la jaro **2001**

| Nro | Red.grupo komencas | Limdato | Aperas |
|-----|-----------------------|---------|--------|
| 1 | 3.1 | 15.1 | 1.2 |
| 2 | 1.3 | 15.3 | 1.4 |
| 3 | 1.5 | 15.5 | 1.6 |
| 4 | 1.7 | 15.7 | 1.8 |
| 5 | 1.9 | 15.9 | 1.10 |
| 6 | 1.11 | 15.11 | 1.12 |

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

Ilmoitushinnat

Ulkopuoliset

mainostajat:

1/1 sivu 600 mk

½ sivua 400 mk

1/4 sivua 250 mk

Jäsenet:

1/1 sivu 300 mk

½ sivua 200 mk

1/4 sivua 125 mk

Redakta grupo de Esperantolehti



*Aimo Rantanen,
Vaajakoski*

*Anna Ritamäki,
Kimito (sen foto)*

*Ilkka Santtila,
Helsinki*



*Jukka Laaksonen,
Tampere*



Raita Pyhälä, Lestijärvi



*Jukka Vaijärvi,
Helsinki*



Aini Vääräniemi, Taivalkoski



Riitta Hämäläinen, Helsinki

Esperanto-vivo en Taivalkoski

Fabelkonkurso de Päätaalo-instituto*

En la nomtago de Satu, la 18an de oktobro, okazis en Taivalkoski la ĉefa festo de la Napero-tempo, t.e. premiofesto de la fabelkonkurso. Dum la Napero-tempo okazis multaj amuzaĵoj, koncertoj, teatraĵoj pupaj kaj aliaj, kaj la infanoj kaj lernejoj povis okupiĝi ekz. pri komponado, polurado de ŝtonornamaĵoj kaj konatiĝi kun la historio de arbarlaboroj kaj lernejoj.

La etoso de la premiofesto inter bivakfajroj kaj lumĵetiloj estis mistera kaj fabeleca. La pluvetado ne povis fuŝi ĝin. Se oni havis taŭgan lokon ĉe la ternivela podio, oni povis vidi klaŭnojn, akrobatojn kaj aliajn cirkanojn. Inter la spektantaro petolis du julaj koboldoj, kaj la programon partoprenis ruĝe vestita Julavo kun tute blanka Neĝenjo.

Al la Esperanto-branĉo de la konkurso venis 25 verkaĵetoj el 8 landoj (Bulgario, Ĉeĥio, Finnlando, Francio, Hungario, Kroatio, Rumanio kaj Serbio-Jugoslavio) en tri aĝokategorioj. Pro la longaj distancoj nur 3 premiitoj ĉeestis, nome Kirsi kaj Niina Tauriainen el Taivalkoski kaj Stefani Strunjak kun sia instruistino Judita Rey-Hudeček el Kroatio. La lastaj du povis veturi norden danke al la kunlaboro de pluraj personoj kaj Finnair, kiu flugigis ilin de Budapeŝto al Kuusamo. En la flughaveno ilin atendis la karakteroj de la fabelo de Stefi: "Joulupukki" (Julavo), Neĝeĝino kaj koboldoj, kaj la loka gazeto Koillissanomat atentokapte sciigis pri la evento sub la rubriko "Stefani envojaĝis sian propran fabelon".



Kvar fabelkonkursantoj: Stefani, Kirsi, Niina kaj Elina.

Bedaŭrinde 12-jara Iitu Leinonen, kies fabelo *La kato kaj la sciuro* estis taksita la plej bona en la Esperanta branĉo, ne povis veni. La feston partoprenis ankaŭ kvar membroj de Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj kaj la ĉefdirektoro de UEA, kiu alportis infanlibrojn kiel premiojn. Al la malĉeestantoj la premioj estis senditaj per poŝto. Ĉiu konkursaneto ricevis ankaŭ poŝtkartojn kaj koloran diplomon kun bildo pri boaco kaj saluto el la vilaĝo Metsäkylä. Krome, al Stefani estis donita amuza ligna statueto, kiu nomiĝas Napero Amikeco, kaj Iitu ricevis tabulon Napero Internacia. En la fabelkonkurso medio ili egalas al la "Oskaroj" de la filmindustrio. La finna vorto "napero" signifas "infano" kaj enhavas amuzan kaj teneran tonon.

En la komenco de la premioceremonio Aini Vääräniemi laŭtlegis la nomojn de ĉiuj 9 premiitoj en la Esperanto-branĉo. La nomoj kaj la plej bonaj fabeloj estas rete videblaj ĉe la suba adreso. En la aljuĝado de la premioj ne gravis la senerara lingvo sed la kreiveco de la verkinto, la originaleco kaj enhavo de la fabelo. Poste Stefani brave kaj klare laŭtlegis la unuan alineon de sia verketo *Neĝreĝino*, kaj la tuta rakonto estis resumita en la finna. Sekvis la disdonado de la premioj de la finnlingva branĉo, al kiu estis venintaj milo da fabeloj. Loka fabel-onklo, kuracisto Niilo Keränen intervjuis la infanojn. Fine de la festo estis montrita filmo sur grandega subĉiela ekrano.

La sekvan tagon Sylvia Hämäläinen, Raita Pyhälä kaj la kroataj gastinoj prezentis Esperanton en du lernejoj pere de kantoj, ludoj

kaj rakontado. La esperantistoj ankaŭ partoprenis Arbaro de Zamenhof -ceremonion, dum kiu la infanoj elektis "Arbon de Amikeco". Stefani kaj Judita rajtis dediĉi arbon al sia lando, Kroatio; sinjoro Buller dediĉis alian al UEA; Julavo ekhavis arbon al si. Ĉe aliaj arboj ĉirkaŭe jam pendis ŝildoj dediĉe al Francio, Hispanio, Pollando, Finnlando, Usono, Homaj rajtoj, Paco, Egaleco. Lokaj esperantistoj kaj infanoj kantis esperantigitan finnan popolkanton "Tien foren trans arbar". Ĉiuj tostis kaj rostis kolbasetojn ĉe fajro brulanta en ŝtoncirklo.

La grandan malnovan vivĉambron de la infanaĝa hejmo de Aini Vääräniemi vizitis buspleno da rondvojaĝantoj, kiuj povis iom



*Stefani Strunjak kun sia instruistino
Judita Rey-Hudeĉek.*

*Instituto dediĉita al la verkisto Kalle Päätalo, hejmpaĝo:

<www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti/>

konatiĝi kun la ampleksa Esperanto-eks-
pozicio kaj aŭdi la esperantistojn rakonti,
kiel Esperanto utilas al ili. Vespere trideko
da vilaĝanoj kunvenis en la loka trinkejo
Arbar-Bar, kies prezaro estas skribita ankaŭ
en Esperanto. Ili venis por sperti internaci-
econ en praktiko. Estis montritaj diapozitiv-
oj pri Francio, kaj Judita Rey-Hudeček,
interpretite, mallonge rakontis pri Kroata
kristnasko.

Danke al la Fabelkonkurso de Pääta-
lito la lingvo Esperanto iĝis iom pli kona-
ta. Priaj raportoj aperis almenaŭ en Koillis-
sanomat, Kaleva, Keskisuomalainen, Hel-
singin Sanomat kaj Aamulehti la 19an de
oktobro. Espereble la Esperantlingva branĉo
de la konkurso okazos ankaŭ venontjare kaj
instigos pli multan infanaron partopreni. La
iniciatinto, Aini Vääräniemi, ludas gravan
rolon en la vilaĝo Metsäkylä, kie jam trov-
iĝas pluraj E-lingvaj montriloj kun verdaj
steloj: Pasporta servo, Fiŝkaptado, Vilaĝ-
vendejo, Kafejo kaj aliaj.

Intervjuo kun knabinetoj Niina, Kirsi kaj Elina Tauriainen

– *Saluton, Kirsi kaj Niina. Mi gratulas vin
pro la partopreno en la Tutmonda Fabel-
konkurso de Pääta-
lito. Bonvolu diri,
kiomaĝaj vi estas!*

Kirsi: Mi havas dek jarojn.

Niina: Mi estas ok-jara.

– *Kie vi loĝas?*

Ni loĝas en Taivalkoski, Metsäkylä. Tai-
valkoski estas komunumo kaj Metsäkylä
estas vilaĝo. Nia domo estas granda, ruĝa
bienula domo. Ĝi havas 5 ĉambrojn kaj kui-
rejon, saŭnon kaj banĉambron. La domo
estas du-etaĝa.

– *Kiam vi komencis lerni Esperanton?*

Antaŭ unu jaro, en aŭtuno 1999.

– *Kiu instruas vin?*

Nia instruistino estas Aini Vääräniemi. Ni
uzas la libron Egaleco kaj paco per Espe-

Rezultoj de la esperanta fabelkonkurso

Infanoj malpli ol 9-jaraj

1a premio: Hajnal MacGill, Hungario: *Du azenoj*

2a: grupo el Chateauroux, Francio: *Arbohakisto papilio*

3a: Niina Tauriainen, Finnlando: *Erinaco kiu estis ĉiam malgaja*

9-10-jaruloj

1a premio: grupo el Chateauroux, Francio: *Sirosia*

2a premio kaj premio “Napero Amikeco”: Stefani Strunjak, Kroatio: *Neĝreĝino*

3a: Kirsi Tauriainen, Finnlando: *Aventuro de muso en kuirejo*

11-12-jaruloj

1a premio kaj premio “Napero Internacia”: Iitu Leinonen, Finnlando: *La kato kaj la sciuro*

2a: klaso 5 el lernejo Kvar ventoj, Chateauroux, Francio: *La bavema princino*

3a: Zlatko Dordevic, Serbio-Jugoslavio: *Stranga Vojaĝo kaj Malantaŭ spegulo* (2 fabeloj)

ranto kaj la vidbendon Mazi. Ni lernas Esperanton ankaŭ kun Esperanto-turistoj.

– *Ĉu vi havas korespondamikojn?*

Jes, Niina kaj Kirsi havas korespondamikojn en Francio kaj Elina en Ĉeĥa Respubliko.

– *Ĉu vi aŭdis aŭ legis aliajn konkursofabelojn?*

Jes, ni aŭdis de Aini kaj legis en Interreto. Ni ŝatas fabelojn. Ni havas multe da libroj. Fabellibrojn ni havas dekojn.

– *Kial vi estis tiel seriozaj en la foto prenita post la premiofestoj?*

Ni ne scias. Kutime ni estas gajaj, sed tiam ni estis lacaj kaj konfuzitaj.

– *Elina, kiomaĝa vi estas?*

Mi havas dek unu jarojn.

– *Kiujn hobiojn vi havas?*

Mi legas kaj ludas kun miaj gefratoj. Mi ludas la orgenon kaj iras en argilokurson.

– *Ĉu vi havas fratojn?*

Jes, mi havas kvar fratojn kaj sep fratinojn. Entute ni estas dek du infanoj en nia familio.

– *Ĉu iu alia en via familo scias Esperanton ol Panjo kaj vi tri filinoj?*

Ne. Miaj du fratinoj eklernis Esperanton, sed ili ne plu lernas. Eble pli poste.

– *Via fabelo nomiĝis “Bona knabino”. Ĉu vi mem estas bona knabino?*

Hejme mi estas spontana. Ni ĉiuj helpas, ni havas kuirejajn laborvicojn. Mi purigas, vartas la etulojn kaj helpas en multaj malgrandaj taskoj.

– *Ĉu vi partoprenos la fabelkonkurson en la jaro 2001?*

Jes!

Dankon al vi, knabinoj, kaj fartu bone!

Intervjuis Saliko, helpis la patrino Aira.

Intervjuo kun Iitu Leinonen

Unue mi gratulas vin pro via premio “Napero Internacia”. Ĉu venis al vi aliaj gratuloj aŭ premioj post la konkurso?

– Mi ricevis du librojn kaj iajn aĵetojn kaj diplomon.

Kiel vi sciis pri la Tutmonda fabelkonkurso de Päätalo-instituto?


– Mi vidis anoncon en Interreto.

Ĉu vi verkis vian fabelon unue en finna lingvo aŭ rekte en Esperanto?

– Unue en finna lingvo.

Ĉu vi lernis Esperanton tute sola aŭ kun iu alia?

– Sola.



Iitu Leinonen.

Kial vi eklernis ĝin?

– Ĉar ĝi estas interesa lingvo kaj ankaŭ mia frato lernas ĝin.

Ĉu vi havas aliajn hobiajn?

– Jes, mi ŝatas teatron.

Kien vi metis vian Napero-premion? Ĉu surmuren?

– Mi ne ankoraŭ metis ĝin ien, mi ne havis tempon.

Dankon, litu, ni esperas ke Esperanto donos al vi ĝojon kaj utilon!

(Intervjuis Saliko perpoŝte)

Fabelkonkurso 2000

Kategorio C, 11-12-jaruloj, unua premio kaj premio "Napero Internacia"-penetraĵo.

Iitu Leinonen, Finnlando:

La kato kaj la sciuro

En iu fora regno vivis kato, kiu estis la hejmbesto de la reĝo. Ĝi estis tre bela. Ĝi havis blankan, longan peltaĵon, graciajn piedojn kaj belajn, verdajn okulojn. Kvankam ĝi estis bela, ĝia karaktero estis fiera kaj memŝatema. Ĝi malestimis aliajn katojn kaj prizorgis, ke ili ekvidis, kiel bela kaj nobela ĝi estis.

Ĉiunokte ĝi ekiris kaj neniu alia kato sciis kien ĝi iris. Ilia plej kutima temo estis divenadi la celon de la noktaj ekskursoj de la kato. Sed en unu posttagmezo ĉiu eksciis la veron.

La kato de la reĝo promenadis en la korto de la kastelo, kiam ĝi vidis sciuron, kiu kuris tra la korto. La kato ne toleris entrudiĝantojn en sia korto, do ĝi ĵetis sin al la sciuro. La sciuro grimpis en arbon.

– Kial vi ektimigis min? la kolera sciuro kriis.

– Neinvititaj gastoj ne plaĉas al mi, la kato diris kaj rigardis la sciuron, kun perfida rigardo en siaj verdaj okuloj. – Alie mi kaptus vin, sed miaj ungoj malboniĝis, ĝi daŭrigis.

– Kaj mi estas tiel bonkonduta, ke mi volas fari nenion al vi.

– Bonkonduta! la sciuro diris. – Se vi estus bonkonduta, vi ne irus nokte en la havenon por interbatiĝi kun aliaj katoj.

– Kial vi scias? la kato demandis, surprizita.

– Mi vidis vin. Kaj mi vidis ankaŭ, kiam vi serĉis manĝorestaĵojn kaj ŝtelis fiŝojn.

– Ĉit, la kato ekkriis kaj rigardis ĉirkaŭe ektime. Sed malfrue. Du birdoj aŭdis la parolon de la sciuro, kaj ili ekiris disvastigi la novaĵojn. Baldaŭ ĉiuj katoj en la regno sciis pri la hejmbesto de la reĝo. Unuj ridis, aliaj malaprobis ĝian malreĝan konduton.

Kiam la kato komprenis, ke la birdoj ekiris disvastigi la novaĵojn, ĝi ruĝiĝis. Ĝi aliiĝis tute ruĝa. Ĝi hontis sian konduton kaj estis neniom fiera. La kato ekvidis, ke ankaŭ ĝiaj okuloj estis ruĝaj kaj ili ne realiĝis verdaj. Ĝi ne volis resti kun siaj ruĝaj okuloj en la lando sed foriris al alia regno.

La tempo pasis. La reĝo havigis al si novan hejmbeston kaj la ekshejmbeston forgesis. Sed la ekskato de la reĝo neniam revenis. Ĝia karaktero ŝanĝiĝis; ĝi estis nun afabla, ĝentila kaj helpema. Ĝi havis idojn, kaj ili havis ruĝajn okulojn. Se vi iam vidis katon, kiu havas ruĝajn okulojn, vi scias, ke ĝia prapatro estis la hejmbesto de la reĝo.

Sunaj aŭtunaj tagoj de EAF

La loko por renkontiĝi ĉi-aŭtune estis la popolinstituto de Perheniemi en Iitti meze de vastaj kampoj. Tie kolektiĝis sesdeko da esperantistoj. Estis ĝojige vidi ankaŭ junajn partoprenantojn, nome Miamaria Saastamoinen, knabinetoj Aura Mikkola kaj Krista kaj Katri Kosunen. La du laste menciitaj estas la tria generacio de la esperantista familio Kilpinen. Gratulojn! Internacian etoson kreis Dana Messner el Ĉeĥio, Larbi el Maroko kaj Brian Moon el Luksemburgio, kiu porokaze loĝas en Finnlando.

Popolinstituto de Perheniemi estas tre taŭga loko por niaspecaj aranĝoj. En la ĉefkonstruaĵo situas la salonego kun vera orgeno, diferencaj agadĉambroj ekz. por masaĝado, manĝejo, oficejo saŭno ktp. En la malnova ĉefkonstruaĵo de la bienego de Perheniemi nun estas la laborĉambroj kun ekz. multaj teksiloj. Farado de lignaĵoj havas sian propran malnovan bienegan konstruaĵon kaj la kursanoj siajn malaltajn pli novajn loĝejojn trans la korto. La kuirejo gastigis nin per bonega multflanka vegetara manĝaĵo, kiun



Fotoj: Sylvia Hämäläinen.

oni ĉiam manĝis tro multe, ĉar interesiĝis kompreneble gustumi ĉiujn specojn!

La programo estis ree kompilita multflanka. Sabate post la malfermo de la prezidanto Jukka Laaksonen ni aŭdis raportojn pri la okazintaĵoj dum la jaro 2000. Terttu Tyynelä rakontis pri Kultura Esperanto Festivalo en Helsinko, Sylvia Hämäläinen pri Esperanto-kursoj en la popolinstituto de Valamo, Jorma Toropainen pri la Universala Kongreso en Tel Avivo kaj Sakari Kauppinen pri Himalaja Renkontiĝo en Nepalo.

Posttagmeze ni koncentriĝis en bona sano kaj longa vivo. Ni diskutis en grupoj pri diversaj temoj ĉirkaŭ sanflegado. Kelkaj studentoj kaj antaŭaj studentoj preparis por ni kvar lokojn por konatiĝi kun la studataj temoj en la lernejo: malstreĉiĝo, naturkuracado per abela vakso kaj brasiko, Kajava-

terapio kaj piedbanado uzante herbojn.

Vespere daŭrigis la serio de gravaj finnaj esperantistoj kaj ĉifoje estis la vico de Vilho Setälä. Ni aŭdis rememorojn pri li kiel esperantisto, tradukanto, kompilanto de multaj lerno- kaj aliaj libroj, instruisto, inventisto kaj pioniro de fotografado. Jukka Laaksonen faris ekspozicion pri multaj libroj, kiujn Setälä skribis.

Kiel antaŭnokta programo ni vizitis Nepalon pere de diapozitivoj de Sakari Kauppinen.

Dimanĉa programo komenciĝis per promenado gvidata de Helena Väisänen el la instituto en la cirkaŭaĵo de la instituto. Estis malvarmete sed tamen la varmon de la suno oni sentis tuj, kiam ĝi trovis nin. Dimanĉe okazis ĝenerala kunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando. Estis nur unu punkto por



Konatiĝo kun malstreĉiĝo.



Matena promenado.

decidi. La kunveno elektis novan estraranon, Esa Lång, por la jaroj 2000-2001 anstataŭ Aimo Rantanen. Poste ni aŭdis perspektivojn de la agado: pri EAF (Esperanto-Asocio de Finnlando) Jukka Laaksonen, pri ELFI (Esperanto-Ligo de Finlandaj Instruistoj) Raita Pyhälä kaj FEJO (Finnlanda Esperantista Junulara Organizo) Anna Ritamäki.

La turista parto de ĉi-jaraj Aŭtunaj Tagoj direktiĝis per buso al Kausala, la centro de Iitti, kaj al la preĝeja vilaĝo de Iitti. Fine ni havis tempon butikumi en vendejo de lokaj produktantoj. La interesan ekskurson gvidis kompetente Helena Väisänen.

Sylvia Hämäläinen

”Puhtipöperö” – matenmanĝa recepto de Vilho Setälä

50 ml da tritiko, kuŝinta en akvo tra unu nokto, poste muelitaj / vehnänjyviä, yli yön liotettuja (vesi poistettu siivilän avulla), jauhettuina
80 ml da nuksoj (pätkinöitä), muelitaj (jauhettuina)

15 ml da soija faruno (soijajauhetta, soyolk)

15 ml da tritikaj embrioj (vehnänalkioita)

5 ml da urtika faruno (nokkosjauhetta)

5 ml da gisto (hiivaa)

5 ml da rozbera faruno (ruusunmarjajauhetta)

(1 ml da ĝinsengradika faruno se dezirata / ginsengjuurijauhetta jos halutaan)

Aldone iu frukto, banano, pomo aŭ io alia, laŭ gusto (lisäksi joku hedelmä maun mukaan)

Rememoroj pri Vilho Setälä

Unuafoje mi vizitis kun Pekka Leskelä somere 1967 la hejmon de Vilho Setälä en Iirislahti. Mi aĉetis kelkajn librojn, mi ja ŝatas librojn. Aŭtune 1967 ĉe la universitato de Helsinki estis aranĝita ia kunveno pri la estonteco de fremdlingvo-instruado. Tiu-tempe mi kelkfoje renkontiĝis kun Joel Vilkki, kiam li venis al Helsinki viziti sian filinon Heljä Faven. Li petis ankaŭ min partopreni en tiu kunveno kaj diris ke V. Setälä ankaŭ venos. Nu, en tiu kunveno kolektiĝis centoj da studentoj de fremdaj lingvoj. Mi devas diri ke ili ambaŭ montris grandiozan civilan kuraĝon aperante sur la podio por pledi Esperanton kiel avantaĝon kaj tempoŝparilon ĉe la instruado de fremdaj lingvoj. Post tiu evento mi demandis al V. Setälä, ĉu troviĝas en lia domo eta spaco por mi, mi povus ja helpi en neĝoŝovelado kaj aliaj taskoj. Li interkonsiliĝis kun sia edzino Marke kaj ili konsentis. Nepra kondico estis nefumado kaj feliĉe mi ne fumas. Mi loĝis en la subtegmentejo de ilia domo – aŭ prefere de Fondumo Esperanto, ĉar ili donacis la nemoveblaĵon al tiunoma fondaĵo – tri kaj duonan jarojn kaj unu jaron en apuda somerdometo.

Foje Suomen Kuvalehti titolis Vilho Setälän Leonardo da Vinci de Finnlando. Li elstaris en multaj fakoj, fotografio kaj Esperanto, li verkis longan vicon da libroj pri diversaj manlaboroj kaj hobiaj, li estis ankaŭ inventisto. Li magistriĝis pri matematiko kaj fine estis distingita per honora doktoreco.

Li estis diligenta, ĉiam li okupiĝis pri io. Li ne drinkis nek fumis, nek manĝis viandon. Matene li muelis iujn nuksojn certakvante kaj miksis ilin kun lakto. Kafon li ne trinkis, sed ja fruktoteon. Li estis asketo unu-

vorte. Foje ni iris pluki fungojn, li ŝatis manĝi ilin.

Li estis humanisto, ja liberpensulo. Li diris ke ekzistas nur unu reala mondo. Politike li ne estis interesita, tamen iris voĉdoni.

Unu epizodo el la milittempo: li biciklis en la regiono de Ristiina, estis pluveto kaj li surhavis ruĝan pluvkapoton. Venis policistoj kaj haltigis lin, dirante ke iu kampano denunciis ke sur la vojo biciklas rusa spiono, ĉar havanta surŝultre ruĝan pluvkapoton...

Malofte li grumblis. Tamen li estis sentema al kritiko, ekz. ĉu estis bezone en elementa lernolibro Privilegia vojo analizi la vortojn *numero* kaj *cifero*... aŭ li estis seniluziigita, kiam La finna Radiofonio malakceptis lian PV por radiokurso 1969.

Kiam furiozis en la Akademio de Esperanto disputo pri la karaktero de la participoj la t.n. ita-ata -demando, li estis atisto kaj kulpigis la itistojn pedantaj.

Mi forlasis Fondumon Esperanto en aŭgusto 1974. La cirkonstancoj estis tro mizeraj por mia grandiganta familio, sen fluanta akvo, la puto estis sekiĝinta, la eta salajro ne sufiĉus lupreni normalan loĝejon. Mi interkonsiliĝis kun Simo Raumavirta kaj rapide foriris returne al Kuopio. Tio estis certa ŝoko al V. Setälä, kies edzino forpasis printempe 1974. Li vivis en la ebura turo de grandaj idealoj... poste li akuzis pri la relative malrapida progreso de Esperanto la supersignojn. En la jaro 1980 mi vizitis Fondumon kun hungara esperantisto Vilmos Benczik kaj tiam Vilho Setälä sajnigis same linkece vigla kaj sana kiel ĉiam antaŭe. Poste – mi aŭdis – li komencis demenci, transmigris kun virino al Tampere kaj fine mortis en alta aĝo. Li havis inklinon al

Nepardonebla – diris Setälä

Iam, en la aŭtuno de 1950, Vilho Setälä kaj Arvikolo aŭtobuse vojaĝis de Matinkylä al Helsinki. Kelkaj junaj personoj laŭvoĉe mokadis junan virinon, kiu tre malfacile vojaĝis, bebeton en siaj brakoj kaj alia infaneto mankondukata. Ŝi havis ankaŭ mansakojn, kaj la svingiĝanta veturilo faris la aferon eĉ pli malfacila. La konduto de la gejunuloj vere estis ŝoka, kaj Setälä kun Arvikolo, mem starantaj, ne povis cedi sidilon por la juna patrino. Finfine iu maljunulino proponis teni la bebon kaj la afero plimalpli aranĝiĝis.

En la provizora loĝejo de Setälä oni diskutis la temon de malbona konduto kaj ties kaŭzojn. Pri la belaj kaj decaj manieroj, kiujn oni ne povas regi, se la gepatroj tiujn ne instruas. Vilho Setälä rakontis kiel lia patro multfoje lin kunprenis al Helsinki, (la familio Setälä tiam loĝis en Tuusula). Tie la knabo renkontis multan al li nekonatajn personojn, kaj estis allasita aŭskulti la interparolojn de sia patro kaj tiuj aliaj. Ofte, poste, la patro klarigis al juna Vilho la signifon de multaj novaj vortoj kaj nocioj, kaj pri la konduto de personoj renkontitaj. Precipe la diskutoj en sveda lingvo, kaj multaj svedaj nomoj, estis mirigaj.*

Arvikolo rakontis pri epizodeto, kiu okazis en bela sabato en majo 1941. La patro de Arvikolo invitis iun "onklon" al restora-

cio, kaj decidis, ke estis tempo por la filo ĉeesti, kiam oni diskutas dum lunĉa renkonto. La restoracio situis en la centro de la urbo, tiel ke oni facile atingis ĝin piede. Sed survoje, en la parko de la parlamento iu juna viro renkontis la duopon, kaj sekvis vigla interparolo. Sed fine la juna viro diris, ke li devas ne maltrafi trajnon, kaj duonkure li forrapidis. "Estis ja simpatia ulo", diris Arvikolo, kaj la patro samopiniis, estis lia kolego, sed "ĉu vi ne rimarkis, kian eraron li faris?" Ne, por tio Arvikolo estis tro juna kaj nesperta. "Certe li ĝustatempe atingos la stacion, sed bone edukita homo ĉiam en iu maniero salutas forirante; ĉu 'adiaŭ', ĉu 'ĝis revido' aŭ io simila, tion postulas la bona konduto".

Estis tiel perokaza kaj trafa, la instruo, ke eĉ hodiaŭ, post preskaŭ sesdek jaroj, ĝi restas en la memoro.



Vilho Setälä estis por Arvikolo vivanta vortaro, kaj ankaŭ alimaniere lingva konsilanto. Foje ili diskutis pri la diferenco inter 'eduki' kaj 'instrui'. En esperantaj vortaroj oni ofte neklare difinas la esperantajn tradukojn de ekz. anglaj 'upbringing' kaj 'education', aŭ la germanaj 'Erziehen' kaj 'Unterricht'.

Tamen laŭ Setälä bona konduto pli valoras ol granda instruiteco. Kiel estas? Arvikolo samopiniis. "Sed la konduto de tiuj gejunuloj estis nepardonebla – por iliaj gepatroj", diris Setälä.

Arvikolo

virinoj, kiel al intelektulo konvenas... J. W. Goethe kaj nia U.K. Kekkonen estu menciataj ĉi-teme.

J. Jäntti

* Tre ĉarme rakontas tian Helsinki-vojaĝon la ABC-libro de E.N.Setälä (Veikon ja Siskon Aapiskirja de 1929)

Mikä on Euroopan kielten teemavuosi 2001?

Euroopan kielten teemavuonna 2001 juhli-taan Euroopan kielellistä monimuotoisuutta ja edistetään kieltenoppimista ja siihen liittyvien taitojen hankkimista. Teemavuoden järjestävät Euroopan unioni (15 jäsen-valtiota) ja Euroopan neuvosto (41 jäsen-valtiota + 6 kulttuuriyhteistyössä mukana olevaa). Tämän tiedotteen lähteenä on käytetty EU:n välittämiä tietoja nettisivuilta:

<<http://europa.eu.int/comm/education/languages/actions/year2001.html>>

Euroopan kielten teemavuoteen sisältyy Euroopan laajuinen tiedotuskampanja.

Seuraavanlaista toimintaa ja edistämistoimia on suunniteltu:

- ◆ Yksityiskohtaisempia tietoja saa erityisiltä verkkosivuilta. Sivuilla on myös erilaisia interaktiivisia kieltenoppimisharjoituksia ja toimintoja.

- ◆ Painotuotteet: julisteet, lehtiset, esitteet ja ”Kielten opiskelijan opas”.

- ◆ Näyttelyt ja tapahtumat.

- ◆ Avoimet ovet kieltenopetusta antavissa laitoksissa.

- ◆ Euroopan laajuiset kilpailut.

- ◆ Kielten eurooppalainen teemapäivä 26. syyskuuta 2001.

- ◆ Aikuisten kieltenopiskelijoiden teema-
viikko 5.–11. toukokuuta.

- ◆ Aiheen käsittely televisiossa, radiossa ja lehdistössä.

Mikä on Euroopan kielten teemavuoden 2001 keskeinen sanoma?

Kielellinen monimuotoisuus on keskeinen osa Euroopan kulttuuriperintöä ja sen tule-

vaisuutta. Kaikilla Euroopassa puhutuilla kielillä on tärkeä osuus. Niinpä teemavuoden aiheena ei ole vain eniten puhuttujen kielten opiskelu kansainvälisen viestinnän helpottamiseksi. Jos todella haluaa ymmärtää muita ja arvostaa heidän kulttuuriaan, on ymmärrettävä heidän kieltään jonkin verran.

Kulttuurienvälinen yhteisymmärrys on yksi monista kielten opiskelun antamista mahdollisuuksista. Vierasta kieltä taitava sijoittuu paremmin työmaailmassa ja pystyy tehokkaammin saamaan kaiken hyödyn eurooppalaisuudesta, etenkin oikeudesta vapaaseen liikkuvuuteen Euroopan unionin alueella.

Jokainen voi oppia puhumaan tai ymmärtämään uutta kieltä, koska se ei ole liian myöhäistä tai liian aikaista. Kielten oppiminen on elinikäinen prosessi.

Niinpä keskeinen sanoma on yksinkertainen: **”Kielten opiskelu avaa ovia, ja jokainen pystyy siihen!”**

Miten teemavuoteen voi osallistua?

Jokainen voi osallistua Euroopan kielten teemavuoteen 2000.

Ensimmäinen ja paras tapa osallistua Euroopan kielten teemavuoteen 2001 on aloittaa uuden vieraan kielen opiskelu tai parantaa jo hankittua kielitaitoa!

Kielten opettajat ja kouluttajat voivat teemavuoden avulla kertoa työstään ja kieltenopiskelun merkityksestä. He voivat myös saada tietoa muiden alalla toimivien työstä.

Toimittajia ja tiedotusvälineitä kannustetaan selostamaan teemavuoden toimintoja ja

osallistumaan teemavuoden virittämiin keskusteluihin. Kansalaisjärjestöt voivat myös hyötyä teemavuodesta ja myötävaikuttaa sen edustavuuteen. Yritykset ja säätiöt voivat tukea ja sponsoroida toimintoja tai yksinkertaisesti rohkaista työntekijöitä osallistumaan teemavuoteen.

Millä tavoin Euroopan kielten teemavuosi eroaa muista eurooppalaisista koulutusohjelmista?

Euroopan kielten teemavuosi 2001 on suunnattu suurelle yleisölle. Nykyiset ohjelmat, esimerkiksi Sokrates ja Leonardo de Vinci, on yleensä suunnattu lähinnä niille, jotka jo ovat tekemisissä kielten opiskelun tai opetuksen kanssa.

Teemavuodeksi suunnitellut toiminnot ovat enimmäkseen lyhytkestoisia kertaloitteita, joissa korostetaan kieltenopiskelua koskevaa tiedottamista. Nykyisiin koulutusohjelmiin sisältyy tavallisesti pitempikestoisia hankkeita tai opettaja- ja opiskelijavaihtoja.

Mitkä kielet kuuluvat teemavuoden piiriin?

Euroopan unionin rahoitusta saadakseen hankkeiden on kohdistuttava yhteen tai useampaan seuraavista kielistä: Euroopan unionin 11 virallista kieltä (tanska, saksa, kreikka, Englanti, espanja, ranska, italia, hollanti, portugali, ruotsi ja suomi), iiri ja lätzeburgin kieli, islanti ja norja (Euroopan talousalueen jäsenvaltioiden kieliä), mikä muu kieli tahansa, jonka Euroopan unionin jäsenvaltiot nimeävät – mukaan luettuina alueelliset ja vähemmistökielet sekä viittomakielet.

Teemavuoden tiedotuskampanjan keskeinen sanoma on neutraali, se ei kohdistu mihinkään erityiseen kieleen tai kieliryhmään: ”Kielten opiskelu avaa ovia, ja jokainen pystyy siihen!” Siinä kaikki!

Lisää tietoja Suomen näkökulmasta saa opetushallinnon kotisivuilta: <www.edu.fi>

Kielten teemavuosi 2001 antaa mahdollisuuksia myös esperantoliikkeelle

Muistatko Prahan julistuksen?

Prahan julistus on julkaistu suomeksi Esperantolehdessä Prahan kongressin jälkeen vuonna 1996. (Teksti löytyy myös monena kieliversiona Internetistä, linkki EAF:n kotisivuilla: www.esperanto.fi)

Kongressin aikana julistus avattiin espe-

rantoliikkeen jäsenille allekirjoitettavaksi. Jokainen sai itse lukea tekstin ja ajatella omalta kannaltaan kannattaako julistuksen antamaa kuvaa esperantoliikkeen periaatteista. Monet tuhannet ovat allekirjoittaneet sen ja maailman esperantoliitto UEA käyttää sitä hyväkseen myös tiedotuksessa.

Kielten teemavuosi ja Prahan julistus

– Miten kielten teemavuosi ja Prahan julistus liittyisivät toisiinsa?

– EU:n ja Euroopan neuvoston julistaman vuoden päämäärissä ja esperantoliikkeen päämäärässä Prahan julistuksen mukaan on paljon yhteistä.

Otteita Prahan julistuksesta:

Me, kansainvälisen esperantoliikkeen jäsenet, osoitamme tämän julistuksen kaikille hallituksille, kansainvälisille järjestöille ja kaikille maailman ihmisille; ilmoitamme, että pyrkimyksenämme on toimia määrätietoisesti tässä julistuksessa ilmaistujen päämäärien toteuttamiseksi; kutsumme kaikkia järjestöjä ja yksityishenkilöitä tukemaan meitä näiden tavoitteiden saavuttamiseksi.

Esperanto, joka julkistettiin vuonna 1887 kansainvälisen apukielen suunnitelmana, kehittyi nopeasti eläväksi ja vivahteikkaaksi kieleksi, ja se on jo toista vuosisataa yhdistänyt ihmisiä yli kieli- ja kulttuurirajojen. Esperanton puhujien päämäärät eivät vuosien kuluessa ole menettäneet merkitystään tai ajankohtaisuuttaan.

1. Katsomme, että kielten epätasa-arvo johtaa epätasa-arvoiseen kommunikaatioon kaikilla tasoilla, myös kansainvälisessä kanssakäymisessä. Me olemme liike demokraattisen kommunikaation puolesta.

2. Katsomme, että millä tahansa kielellä annettu opetus tuo mukanaan kyseiseen kieleen liittyvän maailmankuvan. *Me olemme liike kansallisuusrajat ylittävän kasvatuksen puolesta.*

3. Katsomme, että kansallisten kielten vaikeudet tulevat aina olemaan esteenä monille koululaisille, joille vieraan kielen osamisesta kuitenkin olisi hyötyä. *Me olemme liike tehokkaan kieltenopetuksen puolesta.*

4. Katsomme, että niin pienten kuin suurtenkin kielten puhujilla tulee olla mahdollisuus hankkia *todelliseen kanssakäymiseen riittävä vieraan kielen taito.* *Me olemme liike tämän mahdollisuuden puolesta.*

5. Katsomme, että suuret erot kielten todellisessa valta-asemassa horjuttavat monissa kansainvälisissä asiakirjoissa annettuja takeita ihmisten yhtäläisestä kohtelusta kielisiin katsomatta. *Me olemme liike kielellisten oikeuksien puolesta.*

6. Katsomme, että maailmanlaajuisen viestinnän ja kehityksen edistäminen johtaa useimpien maailman kielten näivettymiseen ja kuolemaan, ellei politiikan perustaksi samalla aseteta kunnioitusta kaikkia kieliä kohtaan ja kaikkien kielten tukemista. *Me olemme liike kielten moninaisuuden puolesta.*

7. Katsomme, että kansallisten kielten yksinomaisen käyttö asettaa väistämättä rajoja sananvapaudelle, tiedonvälityksen vapaudelle ja yhdistymisvapaudelle. *Me olemme liike ihmisen vapautumisen puolesta.*

Vertaa itse kielivuoden päämääriä Prahan julistuksen päämääriin! Voimme siis ihan hyvin järjestää sellaista ohjelmaa, joka hyvin sopii tavalliseen toimintaamme ja samalla olemme mukana edistämässä kielivuoden päämääriä.

Anna Ritamäki

Kalendaro de la Eŭropa jaro de lingvoj 2001

Jen kelkaj gravaj datoj ligitaj al la lingvojaro:

17 januaro

Aperas poŝtmarko honore al la lingvojaro en Finnlando

18–20 februaro

Eŭropa lanĉo de la jaro en Lund, Svedio (EU-prezidanta lando)

21 februaro

Tago de la patrina lingvo (jam tradicia tago de UNESKO)

28 februaro

Lanĉo de la jaro en Finnlando

17–18 marto

Vintraj Tagoj de Esperanto-Asocio de Finnlando en Hämeenlinna, temo “VORTOJ – Mirindas kiam vorte direblas” – “SANAT: Niin ihanaa kun sanotuksi saa”

25 marto – 1 aprilo

Seminario de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo kun la Eŭropa Junulara Centro de Konsilio de Eŭropo en Budapeŝto “La lingva ĉielarko – ponto al kulturaj trezoroj” – “The rainbow of languages – a bridge to cultural treasures”

9–16 aprilo

